
# nia voĉo

## madrida esperanto-liceo decembro 2014

## PROGRAMO DE LA DECEMBRA TAGO DE ESPERANTO

Kiel tradicie, por festi la internacian Tagon de Esperanto, kiu estas celebrata ĉiujare la 15-an de decembro, ankaŭ la madridaj esperantistoj kuniĝos, ĉifoje la tagon antaŭan, dimanĉe.

La 14an ni pasigos do belan tagon honore al la kreinto de nia lingvo. Por tio ni uzos, kiel pasintjare, la sidejon de la kvartala asocio "Asociación de Vecinos de Zofío", distrikto Usera, str. *Ricardo Beltrán y Rozpide, 5*.




Kiel alveni: Metrostacio Plaza Elíptica, aŭ busoj 55, E1, 60 (haltejo Plaza Elíptica) kaj 6 (unua haltejo de Rafaela Ybarra)

La ideo estas havi prelegojn kaj interparolojn matene, poste manĝi surloke, per la materialo alportita de la ĉeestantoj mem, kaj poste daŭrigi la feston kun filmoj, ludoj aŭ simile. Se vi ne povas aŭ emas kuiri, alportu kion vi povos; tio ne estas deviga antaŭkondiĉo por kunfesti; simple venu!.

Ni ankaŭ organizos Libroservon, kiel decas al la Tago. Ĵetu rigardon al la katalogo de SATeH ĉe http://www.nodo50.org/esperanto/libroservo.htm. Se vi volas aĉeti iun konkretan libron el tiu listo, mendu ĝin al pedrosanzsat@gmail.com, kaj en la Z-tago vi ricevos ĝin.

Alian tre specialan kaj tre altiran eron de la festo ni povas jam tute konfirmi: ni povos gustumi la neindustriajn bierojn de la kooperativo Speranto, nomatajn "Zamenhof" kaj "Blanka Tigro" (tiel ĉi, en Esperanto en la nomo!): https://es-es.facebook.com/bassbeer1.




MEL aĉetis respektive 48 kaj 12 boteletojn. La estraro taksis sian devon antaŭgustumi ĝin. Tiucele ĝi kunsidis kun aliaj klubanoj, ne tre solene, la lundon 1an de decembro en la klubejo. La ĉeestantoj unuanime aprobis la decidon.

Proponita programo:

11:30 Renkontiĝo ĉe Intercambiador Plaza Elíptica, ĉe la impona ruĝa fasado, por veni kune al la sidejo.

12:00 Bonveno. Toño del Barrio, prezidanto de HEF, parolos pri: "Legi Zamenhofon".

12:30 Inaŭguro de la libroservo.

12:40 Miguel Fernández prezentos novajn librojn… eĉ en la sveda!

13:30 Félix Lobo: "Interlingvistikaj Studoj en Poznan: instigante partoprenontojn"

14:30 Kuna manĝado per tio alportita de la partoprenantoj mem, plus biera gustumado.


15:30 Tablo-ludoj kaj lingvo-ludoj

17:00 Projekciado de "La plejpleja festivalo", dokumenta filmo pri la Kultura Esperanto Festivalo en Helsinko en 2005

18:00 ordigado de la ejo + adiaŭo

## MADRIDANOJ EN SVEDLINGVA ESPERANTA ANTOLOGIO

Ĵus aperis la antologio *"Söka bostad i storstaden och andra noveller översatta från originalen på esperanto av Leif Nordenstorm och Sten Johansson"* (Serĉi loĝejon en grandurbo kaj aliaj noveloj tradukitaj el la Esperantaj originaloj de Leif Nordenstorm kaj Sten Johansson.)




Tio estas la titolo de 231-paĝa nove aperinta libro en la sveda lingvo. Ĝi estas antologio kun 29 noveloj el diversaj epokoj, stiloj, landoj kaj kontintentoj, la frukto de plurjara laboro. La ideo estas ke svedlingvaj neesperantistoj havu eblecon konatiĝi kun esperanta literaturo kaj ke nia literaturo fariĝu konata, ĉar ĝi tion meritas.

Inter la aŭtoroj, tri estas konataj membroj de la t.n. Ibera Skolo: Liven Dek (Miguel Gutiérrez Adúriz), Jorge Camacho kaj Miguel Fernández. Krome, enestas noveloj de Julio Baghy, Marjorie Boulton, Stellan Engholm, Raymond Schwartz, Trevor Steele, Spomenka Ŝtimec, Ferenc Szilágyi, kaj aliaj klasikaj kaj modernaj aŭtoroj.

## VIZITOS NIN

Ni ricevis mesaĝon de amiko el Almerio, Indalecio Seura, kiu informis ke ekde la 7a de januaro li venos labori al Madrido dum du monatoj. Li estas profesia dancisto. Kvankam lia kompanio respondecas pri la loĝado, li petis al ili ke antaŭ ol fari la serĉadon li volus kontakti kun esperantistoj kiuj eble povus lui al li ĉambron. Se iu el vi interesiĝas pri tiu ebleco, bv. kontakti la adreson de nia bulteno.

## ALIĜO AL MEL

Memoru ke jam malfermiĝis la periodo por (re)aliĝi al Madrida Esperanto-Liceo, dum la jaro 2015 kaj pagi la kotizon. La aliĝilo estas elŝutebla el la retejo de MEL, en la adreso http://www.esperanto.es/pli/images/MEL/MELinscripcion.doc.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. Atentu tamen ke tiu ĉi monato decembro estos speciala pro la festoj, kaj do oni rekomendas antaŭe kontakti la oficejon por certi pri ties malfermo.

En decembro, pro la festoj de la unua semajnfino kaj la baldaŭa okazigo de la Zamenhofa Tago, la unuasabataj renkontoj ne okazos. La 1-an de novembro la babilrondo okazis en nova drinkejo, Sidrería El Tigre, strato Infantas, 30. La loko estas tre populara kaj vere malmulte-kosta, ĉar kun la trinkaĵo oni ricevas teleron plenegan de manĝo. Oni do tiom kontentis ke oni ripetis la rendevuon ankaŭ la 15-an de novembro, kaj probable oni renovigos la sperton en venontaj okazoj.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/, kaj la Fejsbukan forumon https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com